



aktuala

33-a ELDONJARO

Fondita en 1976 de Leo de Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala jurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de 29a de Majo 1957. Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Claude Glady, cglady@arcadis.be, Abona membrigo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52 Sekretario: Hélène Falk-Bracke, 7 avenue des Chênes, 1640 Rhode StGenese, informas +32 2 3584214, helene.falk@skynet.be; Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkredo 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono). Informoj: <http://users.belgacom.net/EBG> <http://ebg.skynetblogs.be> <http://uea.org> www.esperanto.be <http://eo.eventeo.net> 200 ekzemplarkopioj. Vidpunktoj de artikoloj ne spegulas nepre opiniojn de la ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo

ENHAVO

- Paĝo 2 - Hélène Falk-Bracke pri Lidia Zamenhof
- Paĝo 3 - Probal Dasgupta pri sojle al Espero
- Paĝo 4 - Mortigoj en submarŝipo pro nescipovo de la angla
- Paĝo 6 - Poemaro helena, Camoens, Pessoa, Alberto Garcia
- Paĝo 7 - La Papo bondeziris en Esperanto
- Paĝo 9 - Eric Baert pri biciklado en Bruselo
- Paĝo 10 - Casquero kaj Noguero pri Valencio kaj Zaragozo
- Paĝo 11 - Paŭlo Mojaev pri uzado de la akuzativo (2a lasta parto)
- Paĝo 13 - Marc Demonty pri Internacia Konferenco en Bruselo
- Paĝo 14 - Nelly Bracke kaj Barbara Poterucha pri Internacia Festivalo

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

Januaro 2009

28 Michael Cwik pri prezentado de fotoj de UK kaj aliaj

Februaro 2009

- 4 Marcel Delforge pri la unuaj paŝoj de Esperanto en Belgio
- 11 Marek Blahus, studento en Loveno el Brno, Ĉeĥio pri panoramo rilate Pollando
- 18 Barbara Poterucha pri historiaj skizoj el Pollando
- 25 Georgia Henningsen pri Chopin, vivo kaj amo

Marto 2009

- 4 Katarzyna Kuszke pri la tago de la virino
- 11 José Augusto Pinto de Sousa pri pola radio en esperanto
- 18 Bernard-Regis Larue pri unuaj malkovroj de la planedo Marso
- 25 André Demarque pri tradukekzerco en Esperanton de leteroj de Van Gogh

Aprilo 2009

- 1 Semajna kunveno aŭ fiŝa mensogo de Aprilo?
- 8 Bernard-Regis Larue pri lastaj novaĵoj de la planedo Marso
- 12 Paska dimanĉo
- 15 Hélène Falk-Bracke pri kanzonoj kaj folkloraj kantoj de Zamenhof-a tempo
- 22 Jan Amadori pri kaprompiloj, ludenigmoj, puzloj
- 29 Marcel Delforge pri vojaĝoj en Pollando

Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci.

Hélène Falk-Bracke pri la vivo de Lidia Zamenhof, Filino de Esperanto

En 1985 aperis libro «The life of Lidia Zamenhof, Daughter of Esperanto».

Ne estas kutime ke libro pri la vivo de homo nomata Zamenhof devas esti tradukita al Esperanto! La aŭtorino Wendy HELLER estis usona bahaano; al tiu religio, kiu foje proklamas ke «La Bahaŭ movado estas la Esperanto de religioj», ankaŭ Lidia Zamenhof aliĝis fine de la 1930aj jaroj. Siaj gepatroj, Ludoviko kaj Klara Zamenhof-Zilbernik, estis judaj liberpensuloj. Wendy HELLER estis de rusa kaj sud-germana deveno. Ŝi ne scipovis Esperanton, kiam ŝi komencis skribi libron pri Lidia Zamenhof. Ŝi lernis la lingvon verkante ŝian libron por deĉifri dokumentojn kaj kontakti esperantistojn. Ŝi mem spertis kiel la lernado de nia lingvo malfermis al ŝi multajn pordojn en diversaj eŭropaj landoj.

Finfine, en 2007, FEL aperigis tradukon de Bernhard Westerhoff. Mi konsilas legi ĝin por diversaj kialoj: La libro priskribas la tutan vivon kaj idearon de LL Zamenhof: precise, detale senteme. Ĝi ankaŭ priskribas la politikan kaj socian situacion, Ĝi enhavas multajn bildojn, tre bonan indekson, nomas siajn fontojn.

Ĝi povas anstataŭi multajn librojn pri la estiĝo de la lingvo. Ĝi donas la tekstojn de ĉefaj kantoj: La espero (En la mondo venis nova sento...); La preĝo sub la verda standardo (Al vi, ho potenco, senkorpa mistero...) sed ne citas la sesan strofon, malpermesitan en la unua Universala Kongreso (Boulogne-sur-mer, 1905), kiu tekstas jene: Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj/ Antaŭen kun pacaj armiloj/ Kristanoj, Hebreoj aŭ Mahometanoj/ Ni ĉiuj de Di' estas filoj/ Ni ĉiam memoru pri bon' de l'homaro/ Kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro/ Al frata la celo, ni iru obstine/ Antaŭen, senfine.» Eĉ, la vortojn de la pra-esperanta lingvo «Lingwe Unwersala», kantitajn de la samklasanoj de L. L. Zamenhof je la fino de la lasta gimnazia klaso, vi trovos en la libro.

Vi ankaŭ trovos resumon de ĉiuj kongresoj okazintaj antaŭ 1939; vi scios kial Adam kaj Zofia Zamenhof studis medicinon en Svislando kaj ne en Rusio, kie la kvoto de judaj studentoj estis tre limigita. Ankaŭ pri la unuaj prezidentoj de libera Pollando post 1918 vi ricevos informojn. Eble vi pli bone komprenos la sencon de la Interna Ideo.

Vi scios pli pri la gefratoj de Lidia: ambaŭ kuracistoj, ili perfekte parolis Esperanton sed dediĉis sian vivon nur al medicino. Adamo, oftalmologo kiel ilia patro, helpis lin ekde 1914, kiam lia sanstato ne plu permesis labori tuttage. Ili ĉestis ĉiujn kongresojn ĝis sia morto dum la lasta milito. Sed la sola kiu havis Esperanton kiel celon de sia vivo estis Lidia. Hélène Falk



Hélène Falk-Bracke



Lidia Zamenhof 1904-1942



Maurice Wouters

ANONCETO: Nia membro Maurice Wouters, tel: 082 644635, eo.wm.5520(ĉe)skynet.be, 10 rue des Cafrancs 5520 Onhaye, proponas sendi al vi per la poŝto, ĉiu monato dum ses monatoj, de 25 ĝis 30 paĝojn A4 de esperantaj noveloj kaj rakontoj verkitaj de diverslingvaj famkonataj aŭtoroj kontraŭ unu nura abono de apenaŭ 20 Eŭroj, sendkostoj inkludataj. Verkistoj inkludas Cervantes, Andersen, Piron, Mark Twain, Marjorie Boulton, Edgar Allan Poe, kajtielplu. Bonvolu senpere tuj kontakti lin.

ANONCETO alia: Lingvofestivalo okazos sabaton je la 7a de februaro 2009 en Dekenstraat 4, Leuven, de 13h30 ĝis 18h30. Vidu retejo www.talenfestival.be

ANONCETO tria: En la Kultura Centro de Dilbeek (Kamerijklaan 1700) kunvenas ĉiumonate konversacio-rondo, je la sekvaj datoj: sabatoj 24/01, 21/02; 21/03, 25/04; 30/05; 27/06, de la 14a ĝis la 16a horo. Ĉiuj estas bonvenaj. Emile Van Damme, eksa prezidanto de EBG

SOJLE AL ESPERO Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA

Inter la 100-jariĝo de UEA en 2008 kaj la 150-jara jubileo de Zamenhof en 2009, sukcesis 60-jariĝi la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Se ĝuste nun ĉe UN kaj UEA sin sekvas Internacia Jaro de Lingvoj 2008, Internacia Jaro de Interpaciĝo 2009, Internacia Jaro de Lernado pri Homaj Rajtoj 2009 - kvazaŭ ili sciis, ke Zamenhof aktivis por la lingva justeco kaj por la paco - ĉu ni ne ĝoju, ke la astroj mistere agordas la mondon al niaj celadoj? En aprilo ni simpoziiis ĉe UN en Genevo post dek jaroj. En julio niaj kleruloj superrigardis en Amsterdamo la ĉeeston de Esperanto en la universitatoj de la mondo post kvardek jaroj. En decembro ni Zamenhof-festis kun Unesko en Parizo unuafoje. Survoje al Universala Kongreso okazanta unuafoje en Bjalistoko, ni paŭzas por kapti la spiron. Denove UEA engaĝas sin kun la internacia sistemo. Kiaj esperoj instigas la nunan revenon al ĉi tiu scenejo? Kia pensado venigis nin al nia specifa nuno? La okupiĝon pri homaj rajtoj, kiu esprimiĝis jam ĉe Zamenhof, la postmilita UEA, konsciiĝinta pri la graveco de la internacia juro, instalas en sian statuton en 1947, unu jaron pli frue, ol la internacia komunumo, kiu en 1948 formale adoptis la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj. En la 60-aj jaroj, la UEA-prezidanto, kiu estis ankaŭ profesoro pri internacia juro, Ivo Lapenna - lian 100-jariĝon ni festas en 2009 - movis tiun vizion al nova ŝtupo. Lapenna konvinkigis, ke por povi tuŝi la kulturalan konsciencon de la publiko kaj kontraŭ batali la ofte sisteman malrespekton al la homaj lingvaj rajtoj (tian malrespekton li baptis "lingva genocido", termino poste pligraviĝinta), ni devos kulture kaj science trakti kun la klerula mondo. Surbaze de jam establita Uneska vizio pri la interkultura dialogo, UEA iniciatis libroserion Oriento-Okcidento. Pli memstare rimarkinte, ke la socilingvistiko nesufiĉe reliefigas la lingvo-planadon UEA lanĉis fakan lingvopolitikan revuon kun la lingvisto d-ro Victor Sadler ! kiel unua redaktoro. Tiu revuo, Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado (LPLP), fariĝis granda sukceso de nia scienceto, la Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED). Ĝuste ĝi metis la lingvo-planadon sur la mondan sciencan mapon. Se oni lanĉas kulturalan-intelektan entreprenon, oni devas esti pretaj lerni de ĝi kaj ne apriori dikti la konkludojn. Nia Asocio, sub kies egido floris la serio Oriento-Okcidento, fieras

esti la tegmenta organizaĵo de lingvo, kies tradukaĵa korbo fariĝis la plej ekvilibra rilate fontolingvojn. Tradukaĵoj donas al la legantoj okazon por lerni. Ni fieras, ke en kaj ĉirkaŭ LPLP ni multon lernis pri la lingvaj problemoj.

Gravan ŝtupon de tiu lerna procezo reprezentas la Manifesto de Prago, 1996, www.uea.org/informado/pragm/pm_eo.html. Respondojn al la demando "kien UEA" oni serĉu ĉefe en tiu punta dokumento. En kiu senco mi nomas punta tiun Manifeston, kiu markas la komencon de nia kuncerbumado kun movadoj por la lingvaj rajtoj?

Unuflanke la fakton, ke UEA ĉiam donis prioritaton al la savtenado de la lingva kaj kultura trezoro de la homaro, jam antaŭe simbolis la serio Oriento-Okcidento; sed ekde 1996 tiu prioritato apartenas al nia labora tagordo. Aliflanke, ni ne volas kateni al tradiciportaj lingvoj tiujn homojn, kiuj volas ampleksigi la lingvan repertuaron. Ĝuste por maksimumigi ilian liberecon ni pledas por la adicia dulingvismo, kiu baziĝas sur pedagogio aldonanta duan lingvon sen erozio de la unua. Ni agnoskas, ke gravas fasoni eduksistemojn reagemajn al la konkretaj bezonoj de la publiko precipe de tiuj popoltavoloj, kies mendojn la lernejaroj emas malatenti. Tial nia LPLP ofte okupiĝas pri la edukpolitiko por malpotencaj edukatoj.

Ponte inter la serio Oriento-Okcidento kaj LPLP, la Manifesto de Prago pledas por multlingvisma eduko al homaraniĝo, kiu stiros nin pacen. Por kompreni, kiamaniere UEA vizias la Zamenhofan ligon inter la lingva jaro 2008 kaj la interpaciĝa 2009, relegu do niajn esperojn en tiu Manifesto, je kies fino ni "! asertas, ke la ekskluziva uzado de naciaj lingvoj neeviteble starigas barojn al la liberecoj de sinesprimado, komunikado kaj asociiĝo. Ni estas movado por la homa emancipiĝo."

Probal Dasgupta



Korpa gesto estas riĉa parolmaniero de la prezidanto de UEA

4

MORTIGA AKCIDENTO EN SUBMARŜIPO

Amaskomunikilaro raportas ke dudek homoj mortis en akcidento pro misfunkciado de fajrestinga sistemo sur rusa atoma submarŝipo. La proparolanto de la rusa pacifika mararmeo Igor Dygalo diris, ke maristoj kaj ŝipkonstruejaj laboristoj mortis en la okazaĵo, kiu okazis dum enmaraj ekzercoj. La submarŝipo mem ne estis difektita kaj ne estas radiaj likoj. Militistaj prokuroroj estas enketantaj pri la okazaĵo. La submarŝipo, kies nomo kaj klaso ne estas oficiale rivelita, estis devigita interrompi siajn ekzercojn kaj reveni al sia haveno en la fororienta Primorskiy teritorio. Kapitano Dygalo diris, citita de Itar-Tass novajagentejo: "Mi deklaras kun plena respondeco, ke la reaktoro sur la atompropulsata submarŝipo funkcias tute normale kaj la fona radiado estas normala". Estis 208 homoj en la submarŝipo tiutempe, 81 el kiuj estas militistoj. Dudek unu vunditaj homoj estis evakuitaj el la submarŝipo, mararmeaj fontoj diras. Ili estis kondukita al Vladivostoko sur la destrojero Admiralo Tributs. Raportoj diras, ke la akcidento okazis en la antaŭa parto de la submarŝipo. La atoma reaktoro, kiu troviĝas en la pobo, ne estis trafita. Fonto de la ŝipkonstruejo diris al Novosti novajagentejo, ke la ŝipo estas la "K-152 Nerpa", Akula-submarŝipo, sed ĉi tio ne povas esti sendepende konfirmata. La marekzercoj estis organizitaj en la Japana Maro. La Nerpa estis ludonota al la barata mararmeo. La agentejo citante fonton de la rusa pacifika mararmeo, deklaris, ke la submarŝipo revenis al sia haveno je proksimume 09:00 UT dimanĉon. La rusa prezidento Dmitry Medvedev teniĝas plene informita pri la okazaĵo, lia gazetara servo diras. La vicministro pri Defendo Aleksandr Kolmakov kaj la mararmeo Ĉefkomandanto Vladimir Vysotsky tuj flugis al la scenejo de la okazaĵo. La plej malbona submarŝipa katastrofo en Rusio okazis en aŭgusto 2000, kiam la atomenergia Kursk sinkis en la Barenca Maro. Ĉiuj 118 homoj tiam mortis.



La submarŝipo en Vladivostokaj glaciaj maroj - eventeoo.net

NESCIPOVO DE LA ANGLA MORTIGIS DUDEK MARISTOJN

Sekreta, kvincifera kodo, krajone skribita sur komputila terminalo, kontribuis al la morto de dudek personoj en rusia nuklea submarŝipo la 8-an de novembro. Sed la ĉefa kialo de la tragedio kredeble estis, ke multaj rusiaj mararmeanoj ne tre bone scipovas la anglan. La ŝipo estis mendita de la barata ŝtato, kaj ĉiuj instrukcioj estas en la angla. Kiam rusa matroso provis manipuli termostaton, li akcidente ŝaltis la fajroestingan sistemon.



La submarŝipa ŝipanaro, hom-ekipo unu jaro antaŭ la tragedio. Kiam la nova, moderna submarŝipo komence de novembro forveturis por fari testan vojaĝon en la Pacifiko, la sekreta ŝlosila kodo, kiun sciu nur kompetentuloj, estis klare, krajone skribita sur la komputilaj terminaloj de la ŝipo. La intenco kredeble estis, ke kaze de bezono la terminalojn povu manipuli ankaŭ la multaj civilaj specialistoj, kiuj akompanis la ŝipon dum la provvojaĝo.



Dmitrij Grobov kiam eniris en mararmeo en 2005


Laŭ informoj de rusaj gazetoj ŝajnas kredeble, ke la kontrakte dungita matroso Dmitrij Grobov ricevis la taskon kalibri la termostaton en la dua sekcio de la submarŝipo, sekcio ĉefe konsistanta el dormlokoj. Alia eblo estas, ke li simple volis malaltigi la temperaturon, kiu laŭ unu informo estis neelteneble alta - 30 gradoj. Ajnokaze li helpe de la krajone skribita kodo povis malŝlosi la komputilan terminalon en la dormosekcio, sed evidente li ne tute bone sciis, kion li faru sekve. Io malsukcesis pri la manipulado de la termostato, kiu subite informis la centran komputilan sistemon, ke la temperaturo en la dormosekcio estas 78 gradoj. El tio la komputila sistemo faris logikan konkludon: brulas ie, necesas estingi la fajron.



La entombigon akompanis 500 homoj

En malpli modernaj rusiaj submarŝipoj la fajroalarmo devige iras al la kapitano, kiu persone devas fari la decidon ŝalti la estingan sistemon. Tamen ĝuste ĉiu tiu ŝipo estas moderna, kaj krome enhavas sistemojn speciale menditajn de la barata registaro. La submarŝipo laŭplane iĝos parto de la barata mararmeo kaj ekhavas la nomon INS Chakra - tial interalie la informaj ŝildoj kaj

Как развивались события на подлодке «Нерпа»



Submarŝipa skemo

instrukcioj de la ŝipo estas skribitaj en la angla. Krome, diference de la malpli novaj rusiaj submarŝipoj, la automatajn fajroestingilojn eblas ŝalti ankaŭ loke, sen permeso de la kapitano.

Ne estas konate, ĉu ankaŭ la instrukcioj sur la komputila ekrano estas nur en la angla lingvo, sed tio ŝajnas kredebla, konsiderante la manipulojn kiujn entreprenis la matroso. Post kelkaj katastrofaj klavopremoj la dormosekcio estis plenigita de la fajroestinga gaso freono, kaj dudek personoj mortis. Klarigas kapitano Aleksej Suhanov en intervjuo de Komsomolskaja Pravda: -Kompeneble, tie estas kontraŭidiotilo. Eĉ se la matroso enmetis ĉiujn donitaĵojn, la sistemo devas peti konfirmon de la enigo. Juĝante laŭ la rezulto, li ja donis konfirmon. Kiom mi scias, nuntempe oni apenaŭ faras instrukciadon de la personaro.



Dmitrij Grobov edziĝis belan virinon Olga kaj iris en mararmeo

La matroso mem fuĝis el la dormosekcio, kiam eksonis la alarmo, kaj saviĝis. Nun li estas akuzata pri akcidenta mortigo de dudek homoj, kaj riskas multjaran prizonan punon. Same aŭ pli punindaj oni povus tamen konsideri liajn estrojn, kiuj igis maristojn sen la necesa lingvoscio manipuli komplikan submarŝipon. Nuklea submarŝipo ja enhavas ankaŭ sistemojn pli danĝerajn ol la fajroestingilo.

POEMARO

HELENAJ POETOJ

Tre malmultaj nin legas,
tre malmultaj scipovas nian lingvon,
sen aplaŭdoj ni restas, kaj sen justo,
en ĉi fora angulo,
sed kompensas al ni skribi helene.

Kósta Mónde, tradukis João José Santos

TESTAMENTO

Kredas mi poezion kaj amon kaj morton,
tial kredas mi la senmortecon. Mi versas,
versas mi l'kosmon, mi kaj la kosmo ekzistas.
River' fluas de l'pinto de mia fingreto.
La ĉielo sep foje lazuras. Ĉi puro
estas ree l'unua ver', mia vol' lasta.

Giánnis Ritsos, tradukis João José Santos

LASU LA BARKON ... (1a STROFO)

Lasu la barkon laŭvole flugadi sur l'ondo
stirilon kaj velon regu la vento,
la flugilon etendu vi tute, finon la mondo ne havas,
estas pli belaj ĉiam la bordoj nekonataj.
La vivo estas nur prujno, estas ondo,
trenu ĝin kien volas la vento, kien scias la vento ...

Kostas Hatzopoulos(1868-1920), tradukis Spiros Sarafián

LUZIDOJ DE CAMOENS, 1a KANTO, 1-3

Pri faroj kaj baronoj multmeritaj,
el l' okcidenta plaĝo luzitana
tra maroj ne antaŭe luvigitaj
ŝipantaj al la for' trans-taprobana;
al lukto kaj danĝeroj instigitaj,
pli ol promesis homa for' titana,
fondintaj tiam en la malproksimo
reĝlandon kondukitan al sublumo;

pri reĝoj postlasintaj nomojn glorajn
en la memor', ĉar ili prosperigis
la fidon, l'imperio, kaj senmorajn
afrikajn kaj aziajn landojn ligis;
pri tiuj kies verkoj multvaloraj
ilin de l' mortoleĝo liberigis,
dissemos versojn mi en ĉiu parto,
se tiom helpos min talent' kaj arto.

De la Saĝulo Greka, de l' Trojano,
la grandaj navigadoj ĉesu nun;
de Aleksandro, same de Trajano,
mutiĝu l' famo pri batalfortun',
ĉar kantos mi pri l' inda luzitano,
al kiu Mars' obeis kaj Neptun';
de l' Muzo antikva ĉiu kant' cetera
tuj ĉesu antaŭ ĉi valor' supera.

Leopoldo Knoedt tradukis, Chapecó, Brazilo, 1980

ESTANTE, ŜI JAM SURPRIZAS

Estante, ŝi jam surprizas,
Brunblonda kaj altfigura.
Eĉ pense ĝuon provizas
Ŝia korpo mezmatura.

La altaj mamoj simbolus
(Se ŝi kuŝus en sereno)
Montetojn, kiuj aŭrorus
Sen neceso de mateno.

La mano de l'brako blanka
Sin sternas en poz' invita
Sur la elstaraĵo flanka
De l'reliefo kovrita.

Ŝi loĝas kiel barkvelo.
Similetas al oranĝo.
Dio, ĉu mi pasaĝeros?
Malsato, kiam mi manĝos?

Fernando Pessoa, tradukis Francisco Wechsler

AMO KAJ ĴALUZO

Mi vidis kiel floro ĵus naskiĝis
en la ĝardeno: rozo, la plej bela,
bonodora, la plej ruĝa kaj hela,
el ĉiuj kiuj tie troviĝis.

Kaj mi tuj vidis kiel ĝi mortiĝis,
ĉar ĝi ne povis de la grizĉiela
ŝtormo, rezisti al la tro akcela
vento, kaj ĝi al la tero turniĝis.

Regina, ĝi estas kiel la amo,
kiam suferas plena de doloro
pro la ĵaluzo, la ĵaluzo damo,

kaj suferante pro tiu angoro,
apenaŭ naskiĝas la ama flamo,
ĝi mortiĝas kiel la ruĝa floro

Alberto Garcia Orive, Bilbao, al amatino, Regina



Regina kaj Alberto en Olštino, Junio 2008

AL AMATA REGINA.

Nun, kiam ripozas mia animo
laĉa kaj plena de melankolio,
mi eksantas, ke granda nostalgio
ĵus min inundas kaj fluas senlimo

iras al mia koro kaj esprimo
por tie revu pri la melodio,
kiun devas havi la poezio:
mezuro, klara muziko kaj rimo...
...kaj dronante en ĉi tiu torento
el pensoj naĝas for mia rutina
fantazio, vekiga mia sento

kaj tra la blua ĉielo senfina
flugas poemo mia en silento
al via koro amata, Regina.

Alberto Garcia Orive, Bilbao

ORFOJ DE DIO

Amiko ateisto, kara mia!

Vi, kiu ne l' eternan Dio trovas,
kun mi, kiun la pens' pridia blovas,
kunpaŝas en vivpad' samreligia.

Vi zorgas, humanisma ateisto,
pro bono kaj tolero kaj kulturo,
kaj pri forfalo de l'prilingva muro,
mi same, spiritisma humanisto.

Vi preĝas per porpaca penlaboro,
komprenas vian preĝon l' Eternulo
en agoj viaj el am' kaj fervoro.

Al tiu religi' la Hom' sin movos:

"ami kiel sin mem al proksimumo".

La vanton, la ceteron, vent'forblovas.

João José Santos, Estremoz, Portugalujo
Literatura reta revuo "La Karavelo"

LA PAPO BONDEZIRIS EN ESPERANTO

Benedikto XVI ĉi-jare daŭrigis la tradicion kaj inter alilingvaj bondeziroj eldiris siajn kristnaskajn kaj novjarajn salutvortojn ankaŭ en Esperanto. Kiel kutime, en la popolamaso en Vatikana Placo de Sankta Petro ĉeestis esperantistoj, kiuj levis ŝildon kun la vorto "Esperanto" kiam aŭdiĝis la esperantlingva saluto. La ŝildo bone videblis en la rekta televida elsendo, sed la itala televido spite tion mise asertis, ke temis pri saluto en la indonezia lingvo. La teksto "saluto en Esperanto" aperis sur la televidekrano nur kiam la papo jam parolis latine. En 2005 la nova papo Benedikto la 16-a interrompis la multjaran tradicion de sia antaŭulo Johano Paŭlo la 2-a, kaj post sia kristnaska parolado "Al la urbo (Romo) kaj al la mondo" ("Urbi et Orbi") ne eldiris kristnaskajn salutojn en Esperanto. Tiam li decidis duonigi la kvanton de lingvoj, en kiuj li diris mallongajn kristnaskajn bondezirojn. Inter la 32 lingvoj, kiujn li uzis tiam, krom Esperanto mankis interalie la litova, la ĉeĥa kaj la slovaka. Paske 2006 revenis la esperantlingvaj bondeziroj, kaj de tiam ili denove estas regula parto de la paskaj kaj kristnaskaj salutoj de la papo. En Esperanto li kristnaske ĉiujare diras "Dibenitan kristnaskon kaj prosperan novjaron", precize kiel kutimis diri lia antaŭulo Johano Paŭlo la 2-a. Samkiel dum la antaŭaj benoj "Urbi et Orbi", Kristnaske kaj Paske, ankaŭ ĉi-foje grupo de esperantistoj ĉeestis en placo sankta Petro por levi alten la panelojn kiuj konsistigas la vorton "Esperanto". La paneloj klare videblis dum la televida elsendo, kaj Giovanni Daminelli, prezidanto de la itala sekcio de Internacia Katolika Unuiĝo de Esperantistoj, estis intervjuita de ĵurnalistoj. Pri la kristnaska saluto de la papo senprokraste raportis la retejo www.ikea.org, kie legeblas kompleta

esperantlingva traduko de la papa parolado. Laŭ la retejo, la ŝildo de la esperantistoj vekis iom da interesiĝo en la placo: "Kiel kutime, multaj alproksimiĝis por demandi kio estas Esperanto. Tre interese: tra la placo, homoj, kiuj vidis ankaŭ demalproksime la panelojn, ripetis: "Esperanto, Esperanto". Do trairante la lokon, oni ŝajnis esti en E-aranĝo. [Libera Folio](http://www.liberafolio.org)



Samkiel dum la antaŭaj benoj Urbi et Orbi, Kristnaske kaj Paske ankaŭ ĉi-foje grupo de esperantistoj ĉeestis en placo sankta Petro por levi alte la panelojn kiuj konsistigas la vorton "Esperanto".

MESAĜO DE LA PAPO "URBI ET ORBI" (AL URBO KAJ AL MONDO) KRISTNASKON 2008

"Aperuit gratia Dei Salvatoris nostri omnibus hominibus" (Tit2, 11)

Karaj fratoj kaj fratinoj, per la vortoj de apostolo Paŭlo mi reeldiras la ĝojoplenan anoncon de la Naskiĝo de Kristo: jes, hodiaŭ "aperis al ĉiuj homoj la graco de Dio nia Savanto!"

Ĝi aperis! Jen tio, kion la Eklezio hodiaŭ celebras. La graco de Dio, riĉa je boneco kaj mildeco, ne plu estas kaŝita, sed "ĝi aperis", manifestiĝis en la karno, montris sian vizaĝon. Kie? En Betlehemo. Kiam? Sub Cezaro Aŭgusto, dum la unua cenzado, pri kiu aludas ankaŭ evangeliisto Luko, En Li aperis la graco de Dio nia Savanto. Pro tio, tiu Infano nomiĝas Jehoshua, Jesuo, kio signifas "Dio savas".

La graco de Dio aperis: jen kial Kristnasko estas festo de lumo. Ne kompleta lumo, kiel tiu kiu ĉirkaŭas ĉion dum plena tago, sed ĝi estas heleco kiu estiĝas en la nokto kaj disvastiĝas ekde preciza punkto de la universo: el la groto de Betlehemo, kie la dia Infano "venis al la lumo". En la realo, Li estas la lumo mem kiu disvastiĝas, kiel bone bildigas multaj pentraĵoj pri la Naskiĝo. Li estas la lumo, kiu, aperante, rompas la nebuligon, forigas la mallumon kaj ebligas al ni kompreni la signifon kaj valoron de nia vivo kaj de nia historio. Ĉiu kripo estas simpla kaj paroliva invito malfermi la koron kaj la menso je la mistero de la vivo. Ĝi estas renkonto kun la senmorta Vivo, kiu fariĝis mortideva en la mistika sceno de Kristnasko; sceno, kiun ni povas admiri ankaŭ ĉi tie, en ĉi tiu Placo, samkiel en sennombraj preĝejoj kaj kapeloj de la tuta mondo, kaj en ĉiu hejmo en kiu oni adoras la nomon de Jesuo.

La graco de Dio aperis al ĉiuj homoj. Jes, Jesuo, la vizaĝo de la Dio-kiu-savas, ne manifestiĝis por malmultaj personoj, por kelkaj, sed por ĉiuj. Estas

8

vere, ke en la humila, senornama loĝejo de Betlehemo Lin renkontis malmultaj personoj, sed Li venis por ĉiuj: judoj kaj paganoj, riĉuloj kaj malriĉuloj, proksimumoj kaj malproksimumoj, kredantoj kaj nekredantoj... por ĉiuj. La supernatura graco, laŭ volo de Dio, estas destinita al ĉiu kreitaĵo. Necesas tamen, ke la homa estulo ĝin akceptu, eldiru sian "jeson", kiel Maria, por ke la koro estu lumigata fare de radio de tiu dia lumo. Akceptis la enkarniĝantan Parolon, en tiu nokto, Maria kaj Jozefo, kiuj atendis Lin kun amo, kaj la paŝtistoj, kiuj viglis ĉe la ŝafaroj (kp Luk 2,1-20). Malgranda komunumo, do, kiu alvenis por adori la Infanon Jesuon; eta komunumo kiu reprezentas la Eklezion kaj ĉiujn bonvolajn homojn. Ankaŭ hodiaŭ tiuj, kiuj en la vivo atendas kaj serĉas Lin, renkontas Dion, kiu por amo fariĝis nia frato; tiuj, kies koro emas al Li, tiuj deziras koni lian vizaĝon kaj kontribui por la alveno de lia Regno. Jesuo mem diros tian, dum sia predikado: la malriĉaj en spirito, la afliktitoj, la humilaj, tiuj kiuj malsatas justecon, la kompatemaj, la kore puraj, la pacigantoj, tiuj, kiuj estas persekutitaj pro justeco (kp Mat 5,3-10). Tiuj ĉi agnoskas en Jesuo la vizaĝon de Dio kaj foriras, kiel la paŝtistoj de Betlehemo, renovigitaj en la koro per la ĝojo de lia amo.

Fratoj kaj fratinoj, kiuj aŭskultas min, al ĉiuj homoj estas direktita la anonco de espero, kerno de la mesaĝo de Kristnasko. Por ĉiuj naskiĝis Jesuo kaj, kiel en Betlehemo Maria Lin prezentis al la paŝtistoj, en tiu ĉi tago la Eklezio prezentas Lin al la tuta homaro, por ke ĉiu persono kaj ĉiu homa situacio povu sperti la potecon de la savodona graco de Dio, kiu, la sola, povas transformi malbonon en bonon, kiu, la sola, povas ŝanĝi la koron de la homo kaj igi ĝin "oazo" de paco.

Ke povu sperti la potencon de la savodona graco de Dio la multnombraj loĝantaroj kiuj daŭre vivas en mallumo kaj ombro de morto (kp Luk 1,79). Ke la dia Lumo de Betlehemo disvastiĝu en Sankta Lando, kie la horizonto ŝajne denove fariĝas malhela por izraelanoj kaj palestinanoj; ke ĝi disvastiĝu en Libano, en Irako kaj ĉie en Mezoriento. Ke ĝi fekundigu la klopodojn de tiuj, kiuj ne resignacias fronte al la perversia logiko de interalfonto kaj perforto, kaj kiu male privilegias la vojon de dialogo kaj intertraktado, por rebonigi la streĉitecojn interne de la unuopaj Landoj, por trovi ĝustajn kaj daŭrajn solvojn por la konfliktoj kiuj daŭre premas la regionon. Al ĉi tiu Lumo kiu transformas kaj renovigas, petsopiras la loĝantoj de Zimbabvo, en Afriko, kunpremataj ekde tro multe da tempo en la kaptitaĵo de politika kaj ekonomia krizo kiu, bedaŭrinde, daŭre pligraviĝas; samkiel la viroj kaj virinoj de Demokratia Respubliko Kongolando -aparte en la martirigata regiono Kivu-de Darfur, en Sudano, kaj de Somalio, kies senfinaj suferoj estas la tragiĉa postsekco de la manko de stabileco kaj paco. Ĉi tiun Lumon atendas ĉefe la infanoj de tiuj Landoj kaj de ĉiuj Landoj kun

malfacilaĵoj, por ke oni redonu esperon al ilia estonteco.

Kie la digno kaj la rajtoj de la hompersono estas subtretitaj; kie la la personaj aŭ grupaj egoismoj unuarangas sur la komuna bono; kie oni riskas kutimiĝon je la fratomorda malamo kaj ekspluatado de la homo fare de homo; kie internaj luktoj dividas grupojn kaj etnojn kaj disŝiras la kunvivado; kie terorismo daŭre atakas; kie mankas la necesaj por transvivi; kie oni rigardas kun angoro al estonteco pli kaj pli malcerta, ankaŭ en la Landoj de bonstato: ke tie brilegu la Lumo de Kristnasko kaj ke ĝi kuraĝigu ĉiujn fari sian parton, laŭ spirito de aŭtentika solidareco. Se ĉiu prizorgas nur siajn proprajn interesojn, la mondo povas nur ruiniĝi.

Karaj fratoj kaj fratinoj, hodiaŭ "aperis la graco de Dio la Savanto" (kp Tit 2,11), en ĉi tiu nia mondo, kiu havas siajn potencojn kaj siajn malfortecojn; siajn progresojn kaj siajn krizojn; siajn esperojn kaj siajn angorojn. Hodiaŭ, brilegas la lumo de Jesuo Kristo, Filo de la Altega kaj filo de la Virgulino Maria: "Dio el Dio, Lumo el Lumo, vera Dio el vera Dio. Por ni homoj kaj por nia savo descendis el la ĉielo". Ni adoras Lin hodiaŭ, en ĉiu angulo de la tero, ĉirkaŭvolvita kaj metita en malriĉa stoltrogo. Ni adoras Lin silente dum Li, ankoraŭ infano, ŝajne diras al ni, por konsoli nin: Ne timu, «Mi estas Dio, kaj ne ekzistas alia» (Jes 45,22). Venu al mi, viroj kaj virinoj, popoloj kaj nacioj, venu al mi, ne timu: mi venis por alporti al vi la amon de la Patro, por montri al vi la vojon de la paco.

Ni do ekiru, gefratoj! Ni rapide iru, kiel la paŝtistoj en la nokto de Betlehemo. Dio venis renkonten al ni kaj montris sian vizaĝon al ni, riĉan je graco kaj mizerikordo! Ne estu vana por ni lia alveno! Ni serĉu Jesuon, lasante ke ni estu altiritaj de lia lumo, kiu forigas el la koro de la homo la malĝojon kaj la timon; ni alproksimiĝu konfidoplenaj; humile ni surgenuiĝu por adori Lin. Bonan Kristnaskon al ĉiuj!

www.ikue.org

PAPO BONDEZIRIS EN ESPERANTO "DIBENITAN KRISTNASKON KAJ PROSPERAN NOVJARON!"



Post la kristnaska mesaĝo la Papo eldiris siajn bondezirojn en 64 lingvoj. Post la gvarania sekvis tuj ĉi en Esperanto.

ĈU VI VENIS BICIKLE ?

Ja pli kaj pli da homoj de ĉiuj specoj kaj klaskondiĉoj uzas biciklojn en Bruselo. Tamen multaj kaj multaj aliaj neniam alkutimiĝos. Ni legu la senton aŭ eĉ la sperton de nia grupano Eric Baert :

En Belgio, la burĝoj kutime malestimas aŭ mokas la ĉiutagajn biciklantojn ; tiu ĉi artikolo estis ĉerpita el la brusela bulteno de la ĉiutagaj biciklantoj « Bicikle en la urbo ».

La aŭtomobilo estas universala transportilo per kiu eblas serĉi kukojn ĉe la bakisto je distanco de 500 m, aŭ veturi al ripozloko en la sudo de Francio. Do por kelkaj homoj, ĝi iĝis la nura transportilo. Kiam tiuj homoj (tiel nomataj mezaj Belgoj) eliras el sia domo, ili moviĝas nur aŭtomobile. Ni opinias ke oni devas elekti la transportilon laŭ la cirkonstancoj : la distanco, la eblecoj de publikaj transportoj, la urĝeco, la vetero, la kosto, ktp.

En multaj kazoj, la biciklo taŭgas, kaj nia kutimo mirigas multajn mezajn Belgojn. Sed nepre ni kelkfoje devas iri al lokoj tro malproksimaj por bicikli ; ekzemple, mi veturas 40 km trajne aŭ aŭtomobile por vespere ĉeesti kunvenon aŭ viziti amikojn. Certe iu meza Belgo el miaj konatuloj faros moke la kutiman demandon : «Ĉu vi venis bicikle ? ». Antaŭe mi estis iomete konfuzata, sed nun mi respondas ke laŭ la kunteksto, ne ŝajnis al mi oportuna veni bicikle, kaj ke mi venis prefere trajne aŭ aŭtomobile. Kaj mi kelkfoje aldonas : « Kaj vi ? » Preskaŭ ĉiam la respondo estas «aŭtomobile ». Eric Baert, EBG-ano



ĈINAJ STUDENTOJ RETBABILAS

En la ĉina urbo Foŝan, proksima al Kanton, la 17-an de oktobro 2008 okazis interesa lerneja eksperimento, ene de la kurso de Esperanto instruata ĉe la Altlernejo pri Porprofesiaj kaj Teknikaj studoj de tiu urbo. Profitante la bonajn teknikajn eblecojn de la lernejo oni

9
starigis retbabiladon kun pola esperantistino, Grazyna, mem instruistino, de la urbo Toruń.

La junaj gelernantoj (inter 16 kaj 20 jaraj) havis la okazon paroli kun ŝi pere de la reto, kaj eĉ vidi ŝin en giganta ekrano. Ŝi kaj la gelernantoj interŝanĝis salutvortojn, faris facilajn demandojn, kaj ŝi eĉ povis rigardi kiel oni instruas Esperanton al la gejunuloj. Kaj kiel granda surprizo komence de la klaso aperis brazila esperantisto, Silvio Knies, kiu ankaŭ babiladis kun ili (kompreneble simplaj frazoj, ĉar temis nur pri la 3a klaso). Eble por ili unuafoje en sia vivo estis ebleco babiladi kun eksterlandanoj. Tio multege kuraĝigis ilin en la lernado de Esperanto.

La profesoro demandis al la gelernantoj: Vi devige studas la anglan lingvon, dum multaj jaroj. Kun kiom da eksterlandanoj ĝis nun vi parolis pere de la angla lingvo? Ĉiuj respondis: kun neniu. Do, ili nur en tri tagojn povis retbabiladi kun franca esperantisto, Michel Fontain, kun pola esperantistino, Grazyna, kaj vid-al-vide kun Silvio, brazilano, kaj Augusto Casquero, hispano, ilia instruisto.

Ankaŭ loka televido ĉeestis tiun eksperimenton kaj favore raportis. Kompreneble fine de la klaso okazis "foto-sesio". Ĉiuj volis havi fotojn kun la fremduloj. Tre agrable. La konata ĉina esperantisto Cielismo, alveninta el alia urbo, ankaŭ partoprenis.

En la kurso partoprenas ĉirkaŭ 50 gelernantoj de la kurso, inter kiu ankaŭ lernas kelkaj profesoroj. Jam estas vico da alilandaj esperantistoj kiuj voĉas babiladi kun ili. Ĉiusemajne dufoje oni ripetos tiun interesan kaj allogan sperton, kun alilandaj samideanoj (oni preferas junajn, pli interesajn por la junaj gelernantoj).

La gelernantoj bone, diligente, lerte, lernas. Oni pensas ke Esperanto estas lingvo malfacile lernebla por ĉinoj, sed tio tute ne okazas en ĉi tiu kurso. Junaj homoj facile lernas, rapide adaptiĝas al la prononco de la nova lingvo. Kaj mi mem, kiel ilia instruisto, estas ege kontenta kaj kortuŝita instrui ilin. Ĉiuj afablaj, ĝentilaj, laboremaj. La etoso en la klasĉambro estas ege amikeca kaj gaja.

La organizantoj de la kurso, s-roj Jin Peng (lernejestro) kaj Liu Weizhuan (Generala Sekretario de la Kantona Esperanto-Asocio), deziras ke tiuj kursoj daŭre kaj longe okazu.

En la plej granda universitato de Kanton, la Universitata Urbo, ĉe la Fakultato pri Fremdaj Studoj, ankaŭ ĵus komenciĝis kurso de hispana lingvo. Dum la prezentado de la kurso, kun granda partopreno, oni profitis la okazon por iomete paroli pri Esperanto, kiel ponto-lingvo. Kelkaj el la gestudentoj esprimis sian deziron lerni Esperanton. En la kantona asocio oni okazigos kurson por ili.

Augusto Casquero de la Cruz

10

ZARAGOZA ESPERANTA MONUMENTO

Inaŭgurata estis Esperanto-monumento en la urbo Zaragozo (Hispanio), la 13an de decembro, fare de la lokaj esperantistoj kaj lokaj instancoj.



La monumento estas tre bela, simpla sed signifa (kiel Esperanto). La inaŭguro estis tre sukcesa! Alvenis sufiĉe da esperantistoj kaj simpatiantoj (unu el Svislando!). Ne alvenis la pluvo (...ĝis la fino de la inaŭguro). La temperaturo estis ekstere malalta, sed kiel diris J. Marti "la suno fluas tra niaj vejnoj"... Alvenis Emilio Gastón Sanz, (g)rava homo (nepo de la fondinto). Alvenis la Vicurbestro de Zaragozo. Kaj al mi alvenis multe da emocioj kaj emoj pri nia mirinda lingvo per kiu ni spertis la ŝancon interkonatiĝi kun mirindaj personoj. Kore, ĉi-foje kravate sed ĉefe korbate,

Lorenzo Noguero



La monumento inaŭgurita de Lorenzo Noguero, Zaragozo

VALENCIA ZAMENHOF-TAGO

La 13an de decembro oni festis en la hispana urbo Valencio la Zamenhof-tagon. La aranĝo komenciĝis ĉe la sidejo de Grupo Esperanto Valencio, pere saluto al la ĉeestantoj, kaj klarigo pri signifo de tiu evento. Poste okazis prelego pri "Esperanto en Ĉinio", fare de Augusto Casquero, kun prezentado de fotoj, kaj de video kun kantoj fare de ĉinaj esperantistoj, krom kelkaj salutmesaĝoj en video-formo, de samideanoj el diversaj landoj, ĉefe el Ĉinio. Poste ĉiuj iris al apuda restoracio kie oni povis gustumi tipe valencian manĝon. Loka esperantisto anoncis sian pretecon doktoriĝi en Esperanto ĉe AIS-Akademio Internacia de Sanmarino. Li jam havas finita la doktorigan tezon, pri genetiko. La etoso estis tre agrabla kaj amikeca. Kelkaj novaj esperantistoj ĉeestis unuafoje. La nivelo de Esperanto ege pliboniĝis. Praktike ne okazis krokodilado. Augusto Casquero de la Cruz



Kelkaj partoprenantoj ĉe la sidejo en Valencio



Bankedo en Valencio pro Zamenhof-tago



Lorenzo Noguero en Zaragozo parolante ankaŭ kun mano

EPITOMO PRI UZADO DE AKUZATIVO II Akuzativo laŭ Paŭlo Mojaev (daŭriĝo)

Akuzativo estas la lingva elemento, kies ekzisto faras la lingvon pli fleksebla, pli riĉa, sed samtempe kies uzado povas konduki al gravaj miskomprenoj. Generala uzado de akuzativo estas neprega por ĉiu esperantisto, kiu pretendas esti komprenata kaj bona lingvo-uzanto. La tutan aron de reguloj pri uzado de akuzativo eblas dividi je ok grupoj:

1. Akuzativo kiel markanto de rekta objekto (rekta komplemento) de verbo (*vidu en antaŭa Aktuala*).
2. Akuzativo de direkto.
3. Akuzativo en adjektoj (komplementoj cirkonstancaj) de tempo kaj grandeco (mezuro).
4. Akuzativo por indiko de direkto.
5. Akuzativo post vortoj anstataŭ, krom, kiel, kvazaŭ.
6. Akuzativo post prepozicioj.
7. Akuzativo kaj predikativo.
8. Akuzativaj diversajoj.

2. Akuzativo de direkto.

La dua maniero uzi akuzativon estas indiko de direkto. Akuzativo devas esti uzata post la prepozicio, signifanta spacan loĝigon, se estas subkomprenata montrante de direkto (eblas fari la demando "kien?"). Klasika ekzemplo: Kie vi estas? En la ĉambro. Kien vi iras? En la ĉambro.

Plej oftas tiu uzado ĉe la jenaj prepozicioj: en, sur, sub; iom malpli ofte oni uzas tion kun la prepozicioj antaŭ, post, kontraŭ, inter, ekster, ĉe, apud (ja estas diferenco inter "li iris antaŭ mi" kaj "li iris antaŭ min"; "iri inter la arboj" kaj "iri inter la arbojn"; kajtielplu). Ĉe la prepozicio "trans" la uzado/neuzado de akuzativo tute ŝanĝas la sencon de la prepozicio: "Iri trans la rivero (sur la kontraŭa bordo de la rivero); iri trans la riveron (moviĝi de unu bordo al la alia).

Ĉe la prepozicio "en" ĉe la indiko de direkto, eblas forlasi la prepozicion: la variantoj "Mi veturas en Portugalion" kaj "Mi veturas Portugalion" estas sence preskaŭ egalaj. Tamen oni ne praktiku tion kun aliaj prepozicioj, oni ne diru "~~meti libron tablon~~" anstataŭ "meti libron sur/sub tablon".

Oni neniam uzu akuzativon post la prepozicio "al" kaj "ĝis", kiuj per si mem ĉiam montras direkton, kaj post la prepozicioj "de" kaj "el" kiuj signifas formovon.

Oni ofte uzas la akuzativan finaĵon ankaŭ post la adverboj, kiuj signifas lokon, "nun mi estas hejme; nun mi iras hejmen".

Transiro al nova stato povas esti traktata kiel montrante de direkto, tial ankaŭ en tiu ĉi okazo oni uzu akuzativon: "Transformi vorton en faron"; "Vazo frakasigas en mil pecojn"; foje eblas uzi en la sama senco la prepozicion "je" sen akuzativo: "frakasigi je mil pecoj".

Oni ne tro uzu la prepozicion "al" anstataŭ la konstrucion "en ... n". La formoj, kiel "Mi veturas al Lisbono" estas tre ofte uzataj, sed ne tre logikaj, tamen, kiam temas pri geografiaj nomoj oni povas toleri tion, "Vojaĝo al Afriko, flugo al Oporto, kajtielplu". Tamen oni penu ĉiam diferencigi la esence diversajn formojn kiel "iri al parko" kaj "iri en parkon".

3. Akuzativo en adjektoj (cirkonstancaj komplementoj)

de tempo kaj grandeco (mezuro).

Akuzativo estas uzata en adjektoj de mezuro (grandeco), se nur ne estas uzata iu prepozicio. Adjekto de mezuro estas fraz-parto, kiu respondas la demandon "kiom?" (kiom multe? kiom longe/longa? kiom alte/alta? kajtielplu), samtempe estante priskribo de iu verbo (malpli ofte povas esti rekta priskribo de adjekto). Ekzemploj:

- *Mi dormis du horojn - tempa adjekto (kiom longe? kiom da tempo?).*

- *Li aĝas 26 jarojn (= li estas 26 jarojn aĝa) - kvanta adjekto (kiom multe?).*

- *La libro kostas 2 eŭrojn - kvanta (prez-indika) adjekto (kiom multokoste? kiom da mono?).*

- *La monto altas 2 kilometrojn (=la monto estas 2 kilometrojn alta) - kvanta adjekto (kiom da kilometroj?).*

- *Li venis 2 horojn pli frue (kiom pli frue?) - tempa adjekto.*

- *Li foriris 30 minutojn poste (=post 30 minutoj).*

La tempa adjekto (kiom longe) povas esti same esprimita per uzado de la prepozicio "dum" (kompreneble, sen uzado de akuzativo): *mi loĝas ĉi tie jam 20 jarojn = mi loĝas ĉi tie jam dum 20 jaroj.* Diversformaj adjektoj estas uzataj ankaŭ en komparo (ĉi tie diferenco inter la du komparataj valoroj estos esprimita per uzado de akuzativo):

- *Li estas du jarojn pli aĝa, ol mi (=la diferenco inter niaj du aĝoj estas 2 jaroj).*

- *Tiu libro estas 10 eŭrojn pli multokosta, ol tiu ĉi.*

Dum komparo oni povas uzi la prepozicion "je" sen akuzativo:

- *Li estas je du jaroj pli aĝa, ol mi.*

- *Tiu libro estas je 10 eŭroj pli multokosta, ol tiu ĉi.*

4. Akuzativo por indiko de dato

Tradicie akuzativo estas uzata por indiki la daton aŭ tagon de semajno: *Tio okazis la 23-an de aprilo (=tio okazis en la 23-a de aprilo); mi venis sabaton (=mi venis en sabato, sabate).* Kompreneble, por la sama funkcio povas esti uzata ankaŭ la simpla prepozicio "en".

Oni ne uzu tiun manieron por indiki, ekzemple, ĝustan tempon de iu okazo aŭ la jaron de iu evento. Oni ne diru "~~li foriris la trian horon~~" (por indiki la ĝustan tempon de iu evento oni uzu la prepozicion "je": "li foriris je la tria horo"; "li naskiĝis la 1970an jaron" (kun jaroj oni uzu la prepozicion en: *li naskiĝis en la jaro 1970a*).

La fojfoje renkontebla maniero uzi la prepozicion "je" por indiki momenton de tempo, esprimitan per ajnaj tempo-spaco, estas nepre evitinda; anstataŭe oni uzu la prepozicion "en" aŭ akuzativon kun tagoj de la semajno kaj monato. "Je" respondas nur al indiko de ĝusta tempo, esprimita per horoj kaj minutoj. Oni ne diru "~~tio okazis je mateno~~" (anstataŭe *tio okazis matene, en mateno*); "~~li naskiĝis je la tria de marto~~" (anstataŭe *li naskiĝis la trian de marto, en la tria de marto*); kajtielplu.

5. Akuzativo post la vortoj anstataŭ, krom, kiel, kvazaŭ.

Post tiuj vortoj la uzado de akuzativo dependas de la senco, kiun ni volas esprimi. La afero estas, ke en kelkaj okazoj la aparteno de tiuj vortoj al aliaj fraz-membroj povas esti neklara. Ekzemple, la frazo "Anstataŭ knabo patrino batis la hundon" teorie povas esti dusenca: 1: Patrino komence volis bati knabon, sed fakte ŝi batis hundon; 2: Komence estis la knabo kiu devis bati hundon, sed fakte tiun laboron faras la patrino.

Por malebligi tiun dusencon oni uzu tre simplan regulon (formuleblan el la generalaj reguloj pri akuzativo): se post la vorto anstataŭ, krom, kiel, kvazaŭ, sekvas vorto sen akuzativo, do ĝi estas subjekto de la ago; se kun akuzativo, do ĝi estas objekto de la ago. Lige kun tiu regulo la supre prezentitan frazon necesas kompreni laŭ la modelo, prezentita sub la numero 2. Por esprimi la sencon, listigante unue, oni uzu la formo "anstataŭ (bati) knabon patrino batis la hundon". Oni povas diri, ke temas pri ellaso de la verbo "bati" ĉi tie.

En kelkaj okazoj, kiam la kunteksto malebligas miskomprenon, oni emas ellasi akuzativon en tiapecaj frazoj, sed entute tio ne estas rekomendinda. Ekzemple, la frazo "anstataŭ pomoj ni manĝis prunojn" estas klare unusenca (ja estas klare, ke pomoj ne povis manĝi, do la frazo havas la unusolan sencon: komenci ni volis manĝi pomojn, sed fakte ni manĝis prunojn). Tamen pli logika, klara kaj rekomendinda formo estas "anstataŭ pomojn ni manĝis prunojn".

Malpli ofte similaj situacioj povas okazi ankaŭ kun aliaj vortoj. Ni donu nur kelkajn ekzemplojn:

"Ni krom Petro vizitis ĉiujn" - vizitantoj estis ĉiuj escepte Petro.

"Ni krom Petron vizitis ĉiujn" - oni vizitis preskaŭ ĉiujn, sed ne Petro.

Estas klare ke eblas atingi bonan rezulton ankaŭ per alia vortordo kaj uzado de reliefigaj helpvortoj, ekzemple "Ni sen Petro vizitis ĉiujn" aŭ "Ni vizitis ĉiujn, escepte de Petro".

Mi salutas vin kiel prezidanto - fakte, prezidanto estas mi, kaj en tiu rolo mi salutas vin.

Mi salutas vin kiel prezidanton - estas vi, kiu estas prezidanton, kaj mi salutas vin.

Por fari la unuan sencon klara oni proponis uzi la vorto "estiel" (en la rolo de ..., estante mem ...), sed ĝi ne estas vaste uzata. La supre prezentita distinga modelo estas preferinda.

6. Akuzativo post prepozicioj

Kiel ni jam diris, ĝenerale akuzativo ne estas uzata post prepozicioj. Tamen, en kelkaj okazoj ĝi devas esti uzata:

a) dum montrante de direkto. Ĉi tie akuzativo povas esti uzata post ajnaj prepozicioj, signifantaj la spacan loĝikon (*en, sub, super, ĉe, antaŭ, post, inter, apud, ĉirkaŭ, ekster*, kaj kelkaj aliaj).

b) post la prepozicioj "tra" kaj "preter" akuzativo fojfoje povas esti uzata por emfazo, reliefigo de senco de "plenumiteco".

- "Li iras tra arbaro" - li simple moviĝis en arbaro de unu ĝia ekstremaĵo al la alia, preskaŭ "li iris en arbaro.

- "Li iris tra arbaron" - li havis fortan deziron aŭ klaran celon trairi la arbaron.

- "Li iris preter mi" - tiel okazis, ke li iris preter mi, sen interparoli kun mi, eble pro miskompreno.

- "Li iris preter min" - li intence iris preter mi, kvazaŭ dezirante esprimi per tio sian misrilaton. Tiu uzado estas uzata nur tre malofte, plej ofte sufiĉas formoj sen akuzativo

c) post la vorteto "ĉirkaŭ" - La vorto "ĉirkaŭ" havas du signifojn:

- la unua estas spaca signifo (*ni staris ĉirkaŭ la arbo*);

- la dua egalas al "proksimume" (*mi havas ĉirkaŭ cent eŭrojn*). Rolante en sia dua signifo la vorto "ĉirkaŭ" estas rigardata kiel adverbo kaj ne malebligas la uzadon de akuzativo, se ĝi entute estis bezonata: *mi havas ĉirkaŭ dek eŭrojn*.

d) post la prepozicio "po" (kiam ĝi rilatas al la rekta objekto) la akuzativo prefere estu uzata: *Li donis al la infanoj po tri pomojn*.

Akuzativo estas neniam uzata post la prepozicioj "al" kaj "ĝis" (kiuj jam per si mem signifas direkton) kaj post la prepozicioj, kiuj ne povas esprimi la spacan loĝikon (*de, da, por, pro, per, sen, kun, pri*, kajtielplu). Misuzado de akuzativo post "da" estas sufiĉe ofta eraro (*Mi manĝis iom da ĉokolado*), kiu fontas el miskompreno, ke la vorto, troviĝanta post "da" estas parto de la rekta objekto (ja fakte mi manĝis ĉokoladon!). Tamen tiu vorto estas ne rekta objekto, sed prepozicia priskribo de kvanta adverbo "iom": *mi manĝis iom > iom da ĉokolado > mi manĝis iom da ĉokolado*. Neniam uzu akuzativon post "da"!

7. Akuzativo kaj predikativo

Predikativo estas parto de kompleksa predikato, esprimita per neverba parto. En Esperanto predikativo estas esprimita per nominativo (sen n-finaĵo). Plej ofte la predikativo esprimas rezulton de iu ago aŭ ĝian aspekton, ŝajnon, formon.

- Mi fariĝis *studento*. La gloro konserviĝis *senmakula*. Mi trovas la vinon *bona*. Tra ruĝa vitro oni vidas la blankajn objektojn *ruĝaj*. Oni nomis lin *fripono*. Mi sentas min *malsana*. Ofte neĝusta uzado de predikativo povas entute ŝanĝi la sencon de la frazo.

- La *pentristo pentras la knabino ridantan* - La knabino efektive ridas, ŝi estas ridanta, dum la pentristo pentras ŝin. Ĉi tie "ridantan" estas parto de la objekto (ĉar havas la akuzativan finaĵon).

- La *pentristo pentras la knabino ridanta* - La pentristo pentras la knabino tiel, ke ŝi aspektu ridanta, dum efektive ŝi ne nepre ridas. Ĉi tie "ridanta" estas jam predikativo, ĉar ne havas la akuzativan finaĵon kaj staras post la objekto (en la frazo "Ridanta pentristo pentras la knabino" la vorto "ridanta" rilatas jam al la vorto "pentristo", ĝi estus parto de subjekto).

Prenu la kaptitojn vivajn - Oni alvokas kapti nur tiujn, kiuj estas ankoraŭ vivaj.

Prenu la kaptitojn vivaj - Oni alvokas kapti kaptitojn tiel, ke ili restu vivaj (do, ne mortigu ilin). Krom ricevi la nominativan formon, predikativo devas okupi ankaŭ fiksitajn pozicion (post la objekto). Se ĝi okupas alian pozicion, ĝi perdas sian rolon de predikativo. Komparu kun "*Ridanta pentristo pentras la knabinojn*".

Se en la rolo de predikativo estas substantivo kaj en la rolo de predikato (*kopulo*) - la verbo "*aspekti, aperi*" aŭ pasivaj participoj, kiuj esprimas opinion (*esti rigardata, opiniata, traktata, rekonita*), do antaŭ la predikativo oni prefere uzu la korelativan tabelvorton "*kiel*": *Liaj pensoj estas opiniataj kiel stultajo. Li estis traktita kiel krimulo*. La vorton estis oni fojfoje uzas ankaŭ post la verbo ŝajni : *Li ŝajnas esti bona homo*. Tiu uzado estas tolerebla, sed ĉi tie uzado de estis estas tute nenecesa. Entute eblas uzi la vorton "*kiel*" ankaŭ en aliaj formoj de predikativo, sed la lasta en tiu okazo devas alpreni la n-finaĵon: *Oni elektis min kiel prezidanton* = *Oni elektis min prezidanto*.

8. Diversaĵoj pri akuzativo

a) Malgraŭ tio, ke bazaj numeraloj (unu, du, tri, kaj tiel plu) en Esperanto ne ŝanĝiĝas, estas ebla la formo "*unuajn*". La vorto "*unu*" rolas en tiu okazo kiel duondifina artikolo: **Hieraŭ mi renkontis unu mian amikon** - tiu estas, mi scias, pri kiu amiko temas, sed vi ankoraŭ ne scias. Ofte temas ankaŭ pri kontraŭmeto de "*unu*" al "*aliaj*": *Tio, kio entuziasmigas unujajn, ne nepre entuziasmigas la aliajn*. Tamen al formo "*unun*" estas erara; oni ne diru "*hieraŭ mi renkontis unun mian amikon*".

b) Akuzativo povas esti uzata por esprimo de ies pozo aŭ pozicio: *Li pendis kapon suben = per kapo suben; li falis vizajon al tapiŝo*. Eblas diri, ke subkomprenatas la vorto *havante, metante, turninte, kaj tiel plu*.

c) Akuzativo estas uzata en kelkaj kompleksaj prepozicioj, ekzemple *koncerne -n, responde -n, inkluzive -n, rilate -n, escepte -n*.

d) Akuzativo povas esti uzata por diferencigo de aktiva kaj pasiva "*de*". Ekzemple, en la esprimo "*savo de homaro*" ne estas klare, ĉu homaro estas savanta aŭ savata. Por esprimi la aktivan "*de*" eblas uzi prepozicion "*fare de*" (la ofte uzata formo "*far*" aŭ "*far de*" estas, laŭ ni, ege malrekomendinda). Por reliefigi la pasivan "*de*" eblas uzi la tre maloftan (sed Zamenhof-an oportunan) formon "*savo homaron*" (akuzativo estas ja kutima maniero por esprimi la objekton de la ago). Tamen tiu formo ne estas vaste uzata. Zamenhof mem uzis ĝin nur post la *ad-*substantivoj (ekzemple: *ricevado leterojn*).

e) Ne estas bone, kiam apudas kelkaj akuzativoj de diversaj devenoj. Estas rekomendinde en tiuj okazoj uzi diversajn rimedojn por laŭeble distancigi tiujn akuzativajn grupojn. Ekzemple, oni ne diru "*mi ne vidis vin du jarojn*", prefere "*mi ne vidis vin dum du jaroj*"; oni ne diru "*mi aĉetis juvelon 200 gramojn pezajn*", prefere "*mi aĉetis juvelon, kiu pezas 200 gramojn*".

INTERNACIA KONFERENCO EN BRUSELO de Europa Esperanto Unio (EEU)

La 10-an de decembro 2008 okazis en Bruselo (domo de la Internaciaj Asocioj, Washington strato, 40) internacia konferenco de EEU pri « La defio de 2- kaj plurlingva edukado en la 21-a jarcento ». La konferenco ricevis oficialan subtenon de Eŭropa Unio kaj celas subteni Eŭroponivelajn organizojn, kiuj aktivigas sur la kampo de aktiva Eŭropa civitaneco.

La programon partoprenis parte aŭ tute ĉirkaŭ 40 personoj, inter kiuj pluraj eksterlandaj gastprofesoroj, kaj por EBG, 10-o da personoj, kiuj kontribuis diversmaniere al la sukceso de la tago. A. Tsirimokos kaj aliaj prizorgis interpretadon ĉar la konferenco estis ne nur esperantlingva. La prelegoj estis krome en la angla, franca, germana kaj nederlanda lingvoj.

Komence salutis Sean O Riain, prezidanto de EEU, kiu cetere prezidis la tutan tagon, du membrinoj de la Eŭropa Parlamento, s-inoj Novak (Slovenio), kaj Handzlik (Pollando), kaj s-ro Fuhrmann, de la Eŭropa Komisiono. Poste venis la prelegoj, Prof. D. Marsh de la universitato de Jyväskylä (Finnlando), parolis pri « dulingva edukado en la Scisocieto ». Marc Demonty prelegis pri « kelkaj aspektoj de instruado de fremdlingvoj en mezgradaj lernejoj de franclingva Belgio ». Sean O Riain priskribis « la dulingvan edukadon en Irlando ». Prof. W. Janssen de la universitato de Amsterdam prezentis Esperanton kiel science kontrolebla taŭga solvo por la interlingva problemo en Eŭropo. Prof-ino K. Tytgat parolis pri « dudekjaraj plurlingvaj Erasmus-interŝanĝoj en la Erasmus altlernejo de Bruselo.

Agrabla tagmeza lunĉpauzo permesis al la partoprenantoj interbabilen en pli loza etoso. Posttagmeze S-ino A. Tellier klarigis la Britan eksperimenton « Springboard to languages » aŭ kiel profiti maksimume de minimuma investo. Michael Cwik laŭlegis tekston de Germana Ambasadoro apud NATO Ulrich Brandenburg, pri ties spertoj de esperanto kaj la germana kiel familiaj lingvoj. Krome Cwik parolis pri la lingva-orientiga programo, kaj diverseco en lingvo-instruado. Prof-ino K. Kovats argumentis pri la « Propedeŭtika valoro de Esperanto por Hungaraj infanoj ». Slovaka diplomato J. Reinwart rakontis siajn spertojn pri « du- kaj plurlingva edukado en propra familio ». Slovena pedagogo Z. Tisljar prelegis pri « Esperanto kiel konscia celo de du- kaj plurlingva edukado ».

Post bonvena paŭzo, K. Kovats ĉifoje parolis pri « Propraj spertoj de edukado de sia kvarlingva filo ». Fine F. Witdoeckt kiu estis jam enkondukinta la tagon per kantado de la

Eŭropa himno, metis lerte kaj humure la demandon « ĉu aĉeti kaj vendi en la angla? ».

Estis do entute abunda kaj bunta programo, lingve kaj enhave. Laŭdinda iniciato, feliĉe ne nur por esperantistoj. Dankon al la organizintoj kaj partoprenintoj, kiuj dediĉis multe da tempo al preparlaboro. La definitiva rezolucio estos baldaŭ finpreta kaj konsultebla, same kiel supozeble la prelegoj mem. Sekvos informoj pri tio laŭpete.

Marc Demonty, membro de EBG

PRELEGO PRI ASTRONOMIO

Bernard-Regis Larue prelegis, la 14an de Januaro 2009, dum la merkreda kunveno de EBG, pri Astronomio, planedoj Merkuro, Venuso, Urano, Neptuno.



Larue dekstre, post fino kaj eliro de la plejmulto de la ĉeestantoj.

PRELEGO PRI NEOLOGISMOJ

André Demarque prelegis, la 21an de Januaro 2009, dum la merkreda kunveno de EBG, pri Neologismoj en Esperanto.



Demarque maldekstre, antaŭ alveno de ĉiuj ĉeestantoj.

PRI INTERNACIA FESTIVALO

Okazis en Düsseldorf (2008-12-27 / 2009-01-04). Mi estis ege kontenta pri la sperto

kvankam mi timis iomete iri sola. Finfine en IF neniu estas sola se ne volonte serĉas la solecon. Ekde la alveno la etoso estas tute simple amika. Mi konatiĝis kun mia samĉambrino, kiu rapide iĝis mia amikino. En la hotelo, kiu estas tute nova kaj moderna junulargastejo ni havis tre komfortan dultĉambron.

La "kapo kaj cerbo" de tiu organizo estas Hans-Dieter Platz; sian nomon li ŝanĝis per HDP - "*Hodopo*" (preciziginte ke tio estu sen "Sinjoro").

La aktivecoj estis tre variaj; ĉiam oni povis elekti -ofte oni hezitis- inter 4 eblecoj, ĉiam interesaj kelkfoje ĝajaj, kiel la "prelegoj" de la Magiisto/puĉteatristo Triksini, kiu tuĵ ludigis nin tiel, ke ni estis sufiĉe kompetentaj por ludi ni mem per memfaritaj pupoj dum la adiaŭa vespero, la lastan tagon.

Dum la silvestra-vespero, ni estis invititaj al belega bufedo. La plej multaj inter ni sin vestis ege feste kaj poste komenciĝis la muziko sur kiu eĉ tiuj, kiuj ne estis tre spertaj dancistoj, povis kundanci en ĝajaj rondoj.

Do, post la abunda kisdado de la nokto novjara, kelkaj iris observi la stelojn per teleskopo; kelkaj iris ankaŭ eksteren sed por admiri la pireteknikaĵojn.

Mi ankoraŭ ne parolis pri la ekskurso al Aachen, al la 3landa ŝtono, al vilaĝo Kelmis, kie oni provis, kiam ĝi ankoraŭ estis sendependa, instali la unuan sendependan esperanto-ŝtaton. Ne funkciis, ĉar en tiu vilaĝo estis pluraj zinkminejoj, do tiel valoraj ke ĝi estis rapide aneksita.

In Aachen ni vizitis bakejon de la famaj "Aachener Printen", tiuj bongustaj spitaĵ kukoĵoj kiujn ni povis gustumi laŭvole. Post tiu vizito, oni rekonis nian grupon per la ruĝaj sakoj de la "Bäckerei Klein". Ni ankaŭ vizitis la urbon, kun inter alie, la belegan katedralon. Ni tagmanĝis en Moresnet en restoracio "*Select*", en kiu okazis la kunvenoj de la "esperanta ŝtato". La instruisto Mathieu Schrymecker, kiu ankaŭ estas fervora esperantisto, klarigis per grandaj mapoj la historion. Li ankaŭ preparis ekspozicion kun multaj malnovaj fotoj. Li vere estis fiera.

Ni ankaŭ vizitis la malnovan urbon Düsseldorf laŭ la majesta riverego "*Rejno*". Ni multe promenis ĉar la vetero estis, kvankam malvarma, tre bela. Ni vere bonŝancis. Entute ni multe ridis, interkonatiĝis, kantis (tre ofte en la tiea drinkejo "*Knajpe*", kie kelkaj inter ni ludis aŭ gitaron aŭ akordeonon. Mi povus ankoraŭ daŭrigi la raportadon sed mi pensas ke tio sufiĉas por allogi vin por akompani min venontjare. Tiam ĝi okazos en Nördlingen, belega urbeto tute ĉirkaŭita de remparoj (kiel

la tre turista Rothenburg) De tie la ekskurso iros al Nürnberg. Mi pensas ke la etoso estos ankoraŭ pli bone tie. Almenaŭ HDP certas!

Do, ĝis venonta novjaro en IF Nördlingen!

Nelly Bracke, membro de EBG

ANKORAŬ PRI INTERNACIA FESTIVALO

Ne ofte oni povas renkonti, en la sama aranĝo, tiel multe da eminentaj literaturistoj kaj eldonistoj, inter aliaj: Anna Lowenstein, Armela kaj Jak Le Puil, Christiane Oetter, Tacuo Huĝimoto, Mikaelo Bronŝtejn, Paul Peeraerts. Dum aŭtoraj horoj Anna Lowenstein, aŭtorino de la furora romano "La ŝtona urbo", prezentis sian novan romanon "Morto de artisto", en la tempo de la Romia imperiestro Nerono (54 - 68 p.K.). Christiane Oetter prezentis la vivon kaj verkojn de la poetino Rose Auslander (1901 - 1988). Mikaelo Bronŝtejn prezentis kvar tradukitajn librojn, aperintajn dum 2008, kaj ankaŭ prezentis verkitan de li romanon "Dek tagoj de kapitano Postnikov", kiu havos teatran premieron en Bjaltistoko. Karin Arakelyan el Armenio prezentis kelkajn tradukaĵojn kaj originalajn verkojn, ankaŭ proprajn. Josef Semer el Israelo esperantigis pli ol tricenton da judaj ŝercoj de Orienta Eŭropo, kiuj respegulas la vivon de popolo, vivanta en diasporo. Li baldaŭ eldonigos ĝin libroforme. Kun fajna humuro li rakontis kaj ridigis partoprenantojn. Tacuo Huĝimoto el Japanio, prezentis, probable, plej malnovan romanon en la mondo, okaze de la 1000-jara jubileo "Rakontaro Genĝi" kaj verkiston Dazaj - Osam - tre populara. Claude Nourmont (Luksemburgio) gvidis "Frandu Piron" pri la vivo, verkoj, prelegoj kaj konsiloj de belgo-sviso Claude Piron, forpasinta antaŭ unu jaro. Pri literaturo okazis podia diskuto kaj interesa kvizo kun partopreno de publiko. Tradukado, ĉu arto aŭ tekniko? Jak kaj Armela Le Puil el Francio pritraktis tiun temon.

Krome, okazis abundaj prelegoj kaj kontribuoj. Prezento de diversaj vojaĝoj: Armenio, Japanio, Nepalo, Rusio, Venezuelo, Vietnamo, ofte kun gustumado de ties specjaloj. Amri Wandel, profesoro pri astrofiziko, prelegis pri kosmo kaj praktike montris, kiel uzi teleskopon. Ni admiris stelojn! Eugen Macko prelegis pri "Evoluo de naciaj ideologioj ĉe mezeŭropaj popoloj", temo interesa kaj aktuala. Renato Corsetti prezentis: "Lingvistikaj observoj pri kelkaj trajtoj de Esperanto".

Dum unu semajno okazis 66 programerojn, tre variaj, klerigaj, multaspektaj, altnivelaj en neimitebla amika etoso. Ĉiu vespero estis koncerto kaj poste oni povis aŭskulti dum tuta

nokto en drinkejo nomita "Knajpo" lirikajn kaj kortuŝajn rusajn kantojn kun gitara akompano. Ĉiuj povis elekti laŭ bezono kaj plaĉo: korpa ekzercado, dancado, Yogo, Tai Ĉi Cuan, spirita ekzercado, diservo kun Triksini, Mantra, muziko, kantado. Ne mankis kuracistajn konsilojn pri la sano.

Oni ne povas preterpasi ĉeeston de Belgoj kaj Belgujanoj. Ĉeestis 19 Belgoj aŭ loĝantaj en Belgio. Ni Belgoj estis aktivaj en diversaj programeroj. Nelly Bracke prezentis sian talenton en pupteatraĵo kun Triksini. Spontane kreita, internacia koruso en kiu kantis niaj samlandanoj. Kun granda surprizo, aperis sur scenejo danc-grupo, interalie estis Belgoj, kiuj prezentis modernajn dancojn. Admirinda! Al legemulojn Flandra Esperanta Ligo ofertis plej novajn eldonaĵojn.

Apartan mención meritigas la ĉi-jara tutaga ekskurso al trilanda angulo Aachen, Kelmis, Maastricht. Aachen estas urbo 2000 jaraĝa. Monto de iom pli ol 300 metroj kun la limŝtono inter Belgio, Germanio kaj Nederlando, troviĝas apud Kelmis, La Calamine, Moresnet. Elirante de du busoj antaŭ la restoracio nomata "Select", profesia ĵurnalisto filmis partoprenantojn. Antaŭ la enirejo flirtis Esperanta flago kaj salutis nin samideanoj Mathieu Schrymecker kaj Marcel Delforge. Ni eniris historiajn lokojn, kie okazis la fondiĝo de Esperanto-Stato "AMIKEJO" en aŭgusto 1908. Ĵurnalisto daŭre filmis kiam Mathieu Schrymecker, loka Esperantisto, rakontis atentokaptan historiajn eventojn de neŭtrala ŝtato "Moresnet". En aparta salono estis preparita ekspozicio kun historiaj dokumentoj. Li ankaŭ eldonis poŝtkarton kun poŝtmarko. Preskaŭ ĉiuj aĉetis, kiel memorajo de 100-jara unika evento. Dankon al okaza ĉicero Mathieu Schrymecker kaj ĉicero Trude Sinno. Krome, ni estis dorlotitaj per bongusta kaj abunda manĝaĵo. Mankis Oran Libron por enskribi impresojn de kontentaj IF-anoj, diversaciaj Esperantistoj.

Ni revenis poste al IF-o por balpreparoj, lastaprovo de eleganta Polonezo - danco, kiu malfermis Silvestran - balon.

Nur unufoje HDP, Hans-Dieter Platz, ĉefa organizanto de IF-o demandis strikte respekti bufedan ordon por eviti kaoson: 1- fotoebleco; 2- sidiĝo; 3- salutvortoj; 4- manĝo. Laŭ tiu regulo ĉio glate iras. Silvestra bufedo estis atenda kun malpacienca. Novjaraj bondeziraj komenciĝis jam de fora oriento kaj horo post horo, ni atingis noktmezon por saluti Novan Jaron 2009 en Düsseldorf. Kun ŝampano, voĉko, vino. Kisante, ĉirkaŭbrakumante unuj la aliajn, bondezirante, ĉiuj amuziĝis. Verva dancado daŭris ĝis la 6-a horo.

Barbara Poterucha, Dumviva membro de EBG

JUBILEA 25A IF - INTERNACIA FESTIVALO DE DUSELDORFO

de la 27a de Decembro 2008 ĝis la 4a de Januaro 2009



Belgaj kaj Belgujanoj: maldekstre dekstren Roger Goris, Denise Cludts, Vivienne Tudts, Bert Boon, Henny De Ketelaere, Barbara Poterucha, Monica Peetermans, Nelly Bracke, Paula Tytgat De Ketelaere; sidante Paulo Branco, Leo Ribbens, Kristin Tytgat, Diemante Aničiene; dua foto Paulo Branco, Tina Schwarzenstein, Paul Peeraerts, José Augusto Pinto de Sousa, Barbara kaj Ulrich Brandenburg, Kristin Tytgat; tria foto Bernard-Regis Larue



Parto de la 160 ĉeestantoj spektante amuzan pupteatraĵon fare de nia Nelly Bracke kaj de la magiisto Triksini

KOTIZ-TABELO 2009

Nr	Kodo	Kategorio kaj Kotizo	€	Rajtoj
ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO				
11	MEM	Membro de EBG	10	Abono al "Aktuala" (organo de EBG)
12	MEM-R	Membro-junulo (ĝis 26-jara)	5	+
13	MEM-S	Membro-pensiulo, senlaborulo	7	partopreno en la vivo de la Grupo
14	FAK	Familia kunloĝanto	2	Partopreno en la vivo de la Grupo
18	DVM	Dumviva membro de EBG	250	Membreco kaj "Aktuala" dum la tuta vivo
BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIOJ				
21	APE	"Association pour l'espéranto"	14	Membro+Abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva)
22	FEL	Flandra Esperanto-Ligo (FEL)	25	Membro+Abono al "Horizontaal" (grandparte nederlandlingva)
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO				
31	SA	Abonanto de "Esperanto"	38	Abono al "Esperanto", monata organo de UEA
32	Kto	Abonanto de "Kontakto"	23	Abono al "Kontakto", junulara revuo de UEA
33	MJ	Membro kun "Jarlibro"	24	Membreco en UEA + "Jarlibro"
34	MA	Membro-abonanto de UEA	59	MJ + SA + Kto (se junulo) + rabato !
35	MG	Membro kun "Gvidlibro"	10	Membreco en UEA + "Gvidlibro" (sen la adresaro de delegitoj)
36	SZ	Membro de Societo Zamenhof	118	Honora rondo de esperantistoj, finance subtenantaj UEA
37	MD	Dumviva Membro de UEA	1475	MA de UEA dum la tuta vivo! (25XMA kotizo)

Kara abonanto, por ke vi ne ĉesu ricevi Aktualan, bonvolu pagi tuj 10€ abonkotizon 2009 al kasisto